# Congrès à Charleroi

# Okazis IFEF-postkongreso en Valonio

En majo 2023 la IFEF-kongreso okazis en Antverpeno kaj la postkongreso en Valonio.

Vendredon la 12an de majo, 19 postkongresanoj entrajniĝis matene el Antverpeno al Charleroi. Ni renkontiĝis en la stacidomo de Charleroi kaj iris tuj al la junulargastejo por la tagmanĝo. Posttagmeze ni vizitis la « Arbaron de Cazier « en Marcinelle. Georges Sossois ĉiĉeronis nin kaj rakontis interesajn aferojn pri la terura katastrofo de la karbomino, kiu okazis la 8an de aŭgusto 1956. Ni vidis multajn fotojn kaj rigardis filmon pri tiu grava evento. Poste ni vizitis la muzeon de la industrio. Pluraj interesiĝis pri tio. Aliaj vizitis la muzeon de la vitro kaj admiris kelkajn belajn realizaĵojn.

Sabaton matene la 13an de majo, ni entrajniĝis al Namuro. Pieden ni iris de la stacidomo ĝis la telfero promenante tra la urbo: ni vagadis tra la bazaro, aŭskultis klarigojn pri la urbodomo, la placo de la Anĝelo, la placo de Armiloj (kun « Djoseph kaj Françwès »), la Belfrido, la « Halle al Chair », la kunfluejo Sambro kaj Mozo. Ĉirkaŭ tagmezo, per telfero, ni alvenis al la citadelo. Ni tagmanĝis ekstere sur la teraso vidalvide al Terra Nova : agrabla etoso ĉar la vetero estis kun ni. Je la dua horo, la trajneto kondukis nin tra la citadelo dum duonhoro. Ni revenis ĉe Terra Nova kaj rigardis fotojn kaj filmeton pri la historio de Namuro. Fino de la posttagmezo ni revenis per telfero kaj vizitis malnovan kvartalon de Namuro : la placo de « Legommerkado » kun la plej malnova trinkejo de Namuro : la « Ratin-tôt ». Finfine ni vizitis 2 preĝejojn : St-Loup kaj la katedralon St Aubain.

Dimanĉon matene la 14an de majo, ni enbusiĝis al Strépy-Thieu (apud La Louvière). Matene ni vizitis la ekspozicion : « Akvovojoj de hieraŭ, hodiaŭ kaj morgaŭ » kaj rigardis tre interesan filmon pri tio. Ni tagmanĝis en la kafeterio kaj trinkis bonan bieron de la regiono : la « St Feuillien ». Je la dua horo : vojiro per turisma trajneto ĝis la ŝipo kaj krozado sur ŝipo kun transiro de hidraŭlika lifto kaj de aŭtomata kluzo, kaj pasejo de moveblaj pontoj. La homoj tre multe ŝatis. Vespere dum la vespermanĝo, kelkaj el nia klubo preparis la salonon por la adiaŭa vespero ... kaj por festi la datrevenon de Rodica Todor (prezidantino de IFEF). De la oka ĝis la deka kaj duono vespere, ni trinkis, manĝis kukojn kaj kantis kantojn en la valona lingvo. Ĉiuj ĝuis la mirindan etoson !!! Estis belega postkongreso !

Dankon al Francine, Jeanne, Georges, Lucien kaj Hubert, kiuj bone helpis min.

*Michèle VILLERS*

